

Transiraj malfacilaĵoj

Kun granda entuziasmo la nova teamo antaŭ jaro komencis la laboron pri la daŭrigo de la Scienca Revuo. Estiĝis multaj novaj aferoj kaj multaj lernindaĵoj por ĉiuj teamanoj. La tasko modernigi Sciencon Revuon al la interreta epoko montriĝis grandega, Ĉefe se oni rigardas la taskon enretigi la tutan arkivon ekde la jaro 1949-a.

Pri la arkivado ni ricevis grandan helpon flanke de la Interkultura Centro en Herzberg am Harz (ICH), la Esperanto-urbo en Germanio. Ĝi posedas preskaŭ kompletan arkivon de Scienca Revuo kaj persisteme skanadis, tiel ke nun ankaŭ helpe de aliaj fontoj, ekzemple la Esperanto-bibliotekoj en Aalen kaj Chaux-de-Fonds ciferece disponeblas la tuta arkivo de Scienca Revuo de la jaroj 1949-a ĝis 2011-a. Ĝi estos aĉetebla sur DVD-disko de la ICH kaj aperos kiel individuaj artikoloj sur la retejo de Scienca Revuo <http://scienca-revuo.info>.

Sed ne nur pri la pasinteco ni devas okupiĝi. Eĉ pli gravas vivteni la aperigon de la Scienca Revuo. Tiurilate estas kelkaj transiraj malfacilaĵoj. Ni devas trovi novan ekvilibron. Kaj la aŭtoroj kaj la legantoj devas alkitimiĝi al la ŝanĝoj. Samtempe ni devas akiri novajn aŭtorojn kaj novajn legantojn, kiuj ne konsciis pri la ekzisto de la Scienca Revuo, kiu en la Interreto ĝis antaŭ unu jaro preskaŭ ne videblis.

Pro manko kaj da homforto kaj da envenantaj artikoloj ni bedaŭrinde ne sukcesis en la jaro 2012-a aperigi la kutimajn kvar eldonojn de nia revuo. Tamen en tiu ĉi eldono ni denove havas interesajn artikolojn el pluraj kampoj. Ekzemple Hiroŝi Nagata, tre fidela aŭtoro de Scienca Revuo denove kontribuis lingvistikan artikolon ĉi-foje pri la japana kiel kernvort-lastata lingvo. Pri matematiko verkis Adam Łomnicki kun du kolegoj. Terminologian artikolon pri grasaj acidoj kontribuis Anthony Lucas. Kaj ankaŭ ne mankas artikolo pri Esperantologio de Josefo Leiĉ, kiu traktis la fabelon de Zozo. Ne envenis artikolo por la nova rubriko "Scienco kaj socio", kiu espereble estonte ricevos iomete pli da atento.

Intertempe la retejo sufiĉe bone funkcias kaj la tuta procezo estas testita. Do mi povas bonkonsciencie kuraĝigi interesitojn ne nur kontribui artikolojn sed ankaŭ revizii.

Ludwigsburg, marto 2013

Johannes Mueller